Mamuto

Mamuto rekonstruita

Mamuto (verŝajne laŭ la jakuta aŭ mansa lingvo) estas genro de jam formortinta elefantedo, kiu vivis en la lasta glaciepoko grandnombre en Nord-Ameriko, Eŭropo, Azio kaj Afriko ĝis la 40. longitudo.

Ili evoluis el terciera elefantgrupo tra pluraj transiraj formoj, kiuj estis pli kaj pli alkutimiĝintaj al la malvarmo per grasdeponado:

- *Mammonteus primigenius* (Lanhara mamuto) - frua plejstoceno
- *Mammonteus trogontherii* (Stepa mamuto) - meza plejstoceno
- *Archidiskodon meridionalis* (Suda elefanto) - malfrua plejstoceno

Ĝenerale oni pensas pri lanhara mamuto de Nord-Eŭropo, Nord-Azio, kiam oni diras mamuto. La plimulto de la mamuto estis senhara.

Mamuto

Biologia klasado

Regno: Animaloj *Animalia*
Filumo: Ĥorduloj *Chordata*
Klaso: Mamuloj *Mammalia*
Ordo: Rostruloj *Proboscidea*
Familio: Elefantedoj *Elephantidae*
Genro: ***Mamuto*** *Mammuthus* Brookes, 1828

Species

Afrika mamuto *Mammuthus africanavus*
Kolumbia mamuto *Mammuthus columbi*
Pigmea mamuto *Mammuthus exilis*
Ĝefersona mamuto *Mammuthus jeffersonii*
Stepa mamuto *Mammuthus trogontherii*
Suda mamuto *Mammuthus meridionalis*
Lanhara mamuto *Mammuthus primigenius*
Sardinia nana mamuto *Mammuthus lamarmorae*

Aliaj Vikimediaj projektoj

La lanhara mamuto estis unu el la plej gravaj ĉasindaĵoj de la homoj en la malfrua pleistoceno. Tion pruvas multaj grotopentraĵoj. La kaŭzo de malpereo de la mamutoj estas ankoraŭ necerta: aŭ la troa ĉasado aŭ la klimatoŝanĝo kaŭzis tion.

Estas interese, ke la latina genronomo *Mammut* enhavas ne la mamutojn, sed nur la malproksimajn parencojn, la mastodontojn, kiuj tiutempe vivis en Nord-Ameriko kaj evoluigis harojn en la malfrua glaciepoko.

Rekonstruo de mamuto en Parizo.

En la Azia parto de Rusio oni trovas ĉiam denove plenajn mamutkadavrojn, fermitajn en la glacion. Oni serĉas nigre-kaŝe la kadavrojn pro la valora eburo, sed la sciencistoj provas doni monon por la netuŝitaj mamutoj.

Oni provas trovi en la kadavroj plenan genomon (genetikan kodon), por revivigi la mamutojn. Tio ĝis hodiaŭ ne sukcesis, ĉar la mamuto havas tro ampleksan genetikan kodaron.

Proverbo

Ekzistas plura proverbo pri mamuto en la Proverbaro Esperanta de L. L. Zamenhof[1]:

- *„ Kresko mamuta, sed saĝo liliputa. ”*

Eksteraj ligiloj

- Ĉi tiu artikolo legita ĉe traduki.de (http://www.traduki.de/) aŭ YouTube (https://www.youtube.com/user/traduki/videos)
- http://rbcm1.rbcm.gov.bc.ca/hhistory/mammoth/mammothstory.html La Mamuta Etaĝo
- http://www.mammothsite.com Mamuta Situo
- http://fax.libs.uga.edu/E98xP4xM5
- http://www.mammuthus.org/sci/sci_2_2.htm Scienca esploro de la frostiĝinta mamuto trovita en Siberio (france)

Referencoj

1. ↑ Lernu (http://eo.lernu.net/biblioteko/proverboj/listo.php)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Mamuto&oldid=6084601"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:40, 8 jan. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.